# Modifproponoj por la Interna Regularo

La jena dokumento prezentas la proponatajn modifojn al la Interna Regularo de ILEI por trakto en la Komitato de ILEI en Kopenhago en julio 2011.

Alia PDF-dokumento prezentas la plenan tekston kun la modifoj kaj motivoj.

Ni uzos la lumbildojn dum la kunsido por malnecesigi la uzon de grandaj paperkvantoj.

## Punkto 1.1:
## nova teksto por nova punkto

La estraro proponas oficialajn versiojn de la liga nomo en aliaj lingvoj; tiujn aprobas la Komitato.

Komento:

Tio helpas memorigi nin, ke kvankam Esperanto estas nia oficiala lingvo, por plenumi niajn celojn, ni devas komuniki kun la granda mondo, kiu parolas aliajn lingvojn. Ni ne havu konkurencajn nacilingvajn formojn de nia nomo.

# Punkto 4.9.1:

**Ekzistanta teksto:**

La regula eldonaĵo de la Ligo nomiĝas "Internacia Pedagogia Revuo", mallonge "IPR". (Literatur-referenca mallongigo: Int.Pedag.Rev.) IPR aperas minimume tri fojojn en la jaro.

**Nova teksto:**

La oficala organo de la Ligo nomiĝas "Internacia Pedagogia Revuo", mallonge "IPR". (Literatur-referenca mallongigo: Int.Pedag.Rev.) IPR aperas minimume tri fojojn en la jaro.

Komento: Ankaŭ Juna amiko estas regula eldonaĵo de la Ligo. Necesas fiksi ke IPR estas nia oficiala organo.

# Punkto 4.9.3:

**Ekzistanta teksto:**

Pri aliaj eldonaĵoj decidas la estraro.

**Nova teksto:**

Pri aliaj eldonaĵoj decidas la estraro. Pri la Konferenca Libro respondecas la konferencprepara teamo.

Komento: La estraro havas finan respondecon pri la pretigo, sed ne devus mem en normalaj cirkonstancoj labori pri tio. La jarraporto ja estas estrara respondeco – tio povas, sed ne devas, aperi en la Konferenca libro – ni ne fiksu tion.

# Punkto 5.2.1:

**Ekzistanta teksto:**

Membroj loĝantaj en teritorio kie estas sekcio, estas Sekciaj Membroj. Membroj loĝantaj en teritorio kie ne estas sekcio, estas Individuaj Membroj.

**Nova teksto:**

Membroj kiuj aliĝas pere de sekcio estas Sekciaj Membroj. Membroj loĝantaj en teritorio kie ne estas sekcio, aŭ kiuj aliĝas rekte al la internacia ILEI, estas Individuaj Membroj. ILEI rekomendas la individuaj membroj en landoj kun sekcioj estonte membriĝi tra la sekcio.

Komento: Esenca modifo, kiu rekonas la realecon. Evidente, ILEI informu sekciojn pri individuaj membroj en sia teritorio,

# Punkto 5.2.3:

**Ekzistanta teksto:**

Honora Membro estas senpaga membro nomita surbaze de siaj meritoj por la Ligo aŭ por la instruado de Esperanto.

**Nova teksto:**

Honora Membro estas nomumita surbaze de siaj meritoj por la Ligo aŭ por la instruado de Esperanto kaj ekde la honorigo ne plu devas pagi membrokotizon. Aparta regularo preskribas la manieron akceptigi honorajn membrojn.

Komento: La termino 'senpaga membro' estas tro malpreciza.

## Financaj Rimedoj

# Punkto 6.1.1:

**Ekzistanta teksto:**

La kotizo devas esti pagita antaŭ la unua de marto, de la sekciaj membroj al la sekcio, de la individuaj membroj al la Ligo.

**Nova teksto:**

Membrokotizoj de sekciaj membroj devas esti pagitaj al la sekcioj antaŭ la unua de marto, tiel ke ILEI ricevu ilin ĝis la 31a de marto. Individuaj membroj pagas tra reprezentanto aŭ rekte al ILEI, ankaŭ preferinde antaŭ la 31a de marto.

Komento: Ni montru rilaton inter la du limdatoj. Ni akceptas membrojn tra la tuta jaro, sed disciplino utilas. Malfruaj pagoj signifas postliveron de revuoj, kiu portas al la membro malkontenton kaj al ILEI signifan kroman laboron.

# Punkto 7.1.2:

Ĉi tiu punkto estas longa, kompleksa kaj tre mankohava. La revizio bezonos multan diskuton. Ni proponas pludoni tion al la dumkonferenca komisiono por plia studo. Demandoj:

- Ĉu la nombro de sekciaj komitatanoj estu rekalkulitaj ĉiujare surbaze de la sekcia membronombro, aŭ estu fiksita por la trijara mandato de la komitatano?
- Kiom da voĉoj rajtas arigi unu persono?
- Kiel pli precize funkciu anstataŭado? Ĉu alilandanoj rajtas?
- Kiel ni forigu la malbelan svarmon da (j) tra la teksto.

# Aldono fine de punkto 7.1.6:

La elekto de estraranoj okazas skribe. Kandidatoj estas elektitaj ricevinte la simplan plimulton el la validaj voĉoj. Sindetenoj ne estas validaj voĉoj. En kazo de unu kandidato la kunsidestro rajtas proponi voĉdonon per levo de la manoj.  Eksiĝinta estrarano estas unufoje reelektebla, sed eblas pliaj fojoj se du trionoj la Komitato konsentas. En kazo de intertempa eksiĝo de estrarano la ceteraj estraranoj respondecas pri daŭrigo de ties laboro, ĝis anstataŭanto estas enpostenigita, kun la helpo de la elekto-komisiono.

Komento: Kaze de demisio, nepras kiel eble plej rapide trovi novulon, la restantaj estrarananoj jam plenforte laboras kaj ne povas longtempe akcepti pliajn devojn, precipe kiam temas pri sekretario aŭ kasisto, kiuj bezonas administrajn aŭ fakajn konojn.

Financaj Rimedoj

# Punkto 7.1.7:

**Ekzistanta teksto:**

La Kontrola Komisiono pri Financoj konsistas el minimume du membroj kaj vicmembro; el la membroj ĉiujare unu eksiĝas kaj estas anstataŭata de la vicmembro. Ĉiujare la Komitato elektas novan vicmembron.

**Nova teksto:**

La Kontrola Komisiono pri Financoj konsistas el minimume du membroj; ĝi havas tri-jaran mandaton, kiu komenciĝas en la 1-a de januaro en la jaro post la estrarelekto. Pro la neceso fizike enrigardi dokumentojn dum revizorado, la komisionanoj prefere loĝu samlande kun la kasisto.

Komento: en la sekva lumbildo.

# Komento por punkto 7.1.7:

Ni neniam prizorgis tian rotacion, nek havas la rimedojn tion fari, nek tiom da kvalifikitaj homoj por povi tion fari. Ni rezignu pri vic-membroj; la membroj havu simplan trijaran mandaton, kiel ĉiuj aliaj, kun la deziro ke ili troviĝu samlande kun la kasisto. Mandatfino en la 31a de decembro permesas al la malnovaj revizoroj plenumi ajnajn nefinitajn taskojn, kaj donas al la nova estraro (aŭ elekto-komisiono) tempon trovi novajn revizorojn.  Tio gravas, se venas nova alilanda kasisto. Se revizoraj kandidatoj estas jam konataj kiam la estraro estas elektita en fizika kunsido, tiu kunsido povas ankaŭ elekti la komisionanojn, kiuj tamen ekdeĵoru nur jarfine – ili unua tasko estos revizori la kontojn de tiu financa (kalendara) jaro, kiu venas al fino en la momento de ilia enoficiĝo.

# Aldono meze de punkto 7.1.8:

Laborkomisiono estas starigata por difinitaj tasko kaj tempodaŭro. Laborkomisiono konsistas el minimume tri membroj, el kiuj minimume unu estas komitatano. Komisiono havas prezidanton, kiu povas, sed ne devas, esti estrarano. Ĉiu komisiono havas respondecan estraranon, kiu sekvas ĝiajn laborojn. Laborkomisiono raportas al la estraro laŭ interkonsentita maniero. Pri financoj por laborkomisiono estu skriba interkonsento inter la laborkomisiono kaj la estraro.

# Punktoj 7.1.13 kaj 14:

7.1.13 - nuna

Ĝi povas senrajtigi komitatanon, se la sekcio aŭ grupo de individuaj membroj, kiu delegis lin, agis kontraŭstatute.

7.1.13 - nova

Ĝi povas senrajtigi komitatanon, se la deleginta sekcio agis kontraŭstatute.

Komento: En realo, individuaj membroj neniam elektis komitatanojn, kaj ni proponas aboli/modifi tion. Kial "lin"?

7.1.14 - nuna

Ĝi fiksas la membrokotizon por unu jaro.

7.1.14 - nova

Ĝi fiksas la membrokotizon por la sekva jaro.

# Punkto 7.1.18:

Nuna teksto:

En kazo de malfondo de la Ligo la temo devas esti anoncita minimume ses monatojn antaŭ la kunsido pritraktonta la temon.

Nova teksto:

En kazo de propono malfondi la Ligon, la temo devas esti anoncita minimume ses monatojn antaŭ la kvoruma fizika kunsido pritraktonta la temon.

Komento: Temas ne pri la malfondo, sed propono je malfondo. Ni proponas precizigi statute, ke tio povas okazi nur en fizika kunsido. Se tio sukcesos, ne necesos ripeti tion ĉi tie.

# Punkto 7.2.1:

## Nuna teksto

La Estraro rajtas decidi pri ĉiuj aferoj inter du kunsidoj de la Komitato, atentante la gvidliniojn nomitajn sub 7.1.11. Escepte tiujn de prezidanto, sekretario kaj estrarano pri financoj la estraranoj dividu la funkciojn inter si.

## Nova teksto:

La Estraro rajtas fari operaciajn decidojn inter du kunsidoj de la komitato, atentante la gvidliniojn nomitajn sub 7.1.11. Principajn demandojn ĝi diskutigas rete kun komitatanoj, kaj laŭbezone okazigas retajn voĉdonojn, laŭ la koncerna regularo. Escepte tiujn de prezidanto, sekretario kaj estrarano pri financoj la estraranoj dividu la funkciojn inter si.

Komento: Mallogika kombino de du deklaroj. Apartigu? Eksdata kiam eblas reta voĉdonado de la komitato.

# Punkto 7.2.2.2:

Nuna teksto

La sekretario faras la protokolojn de la estrarkunsidoj, tenas la kontakton kun la sekcioj, individuaj membroj kaj la komitatanoj, kompilas la estraran jarraporton kaj sendas la dokumentojn por la komitatkunsido al la komitatanoj.

Nova teksto:

7.2.2.2

La sekretario faras la protokolojn de la estrarkunsidoj kaj la komitato, tenas la kontakton kun la sekcioj, reprezentantoj, individuaj membroj kaj la komitatanoj, kompilas la estraran jarraporton kaj sendas la dokumentojn por la komitatkunsido al la komitatanoj. La sekretario kutime plenumas la membro-administradon, sed tio ne estas deviga.

Komento: Komitat-protokoladon ni solvu alimaniere, se sekretario ne partoprenas. Vidu detalajn komentojn en la plena dokumento.

# Aldono al punkto 7.2.2.4:

Nuna teksto

7.2.2.4

La ceteraj membroj zorgas pri:

- la organiza stato de la Ligo;
- entrepreno kaj ebla efektivigo de agoj kiuj povas servi al la celoj de la Ligo;
- realigo de agadplanoj kaj kunlaborigo de sekcioj en la kampoj sub sia respondeco.

Komento: Tria punkto aldonita, por ke la alineo donu pli da reala gvido.

-----------------

Punkto 7.2.3 pri rotacia elektado estu forigita, konforme kun komitata decido el 2003 'ne plu apliki la alineon'.

# Punkto 7.2.5:

## Nuna teksto:

La skribaj raportoj de la sekretario kaj de la estrarano pri financoj kaj la buĝeto estas sendataj al la komitatanoj minimume tri monatojn antaŭ la komitatkunsido.

## Nova teksto:

La jarraporton kompilas la sekretario laŭ kontribuoj de estraranoj kaj komisiitoj. La estraro kune respondecas pri ĝi. Ĝi inkluzivas la financajn raportojn. Tiuj raportoj estas disponigitaj al komitatanoj almenaŭ unu monaton antaŭ la komitatkunsido.

Komento: Tra jaroj livero tri monatojn antaŭe ne okazis. Eĉ kiam "sendi" estas tuja kaj ne helikpoŝta. En retepoko, monato sufiĉas, kvankam ju pli frue, des pli bone. Ni evitu "sendi", prefere "disponigi". Buĝetoj por novaj jaroj kutime ne pretiĝas julie sed oktobre, kaj estas nun rete livereblaj kaj privoĉdonataj.

# Punkto 7.3.3.1:

Nuna teksto:

Sekciestro devas esti membro de la Ligo almenaŭ du jarojn antaŭ la elekto-jaro kaj resti membro tra la tuta mandato.

Nova teksto:

Sekciestro devas esti internacia membro de la Ligo en la jaro antaŭ la ektrakto de sekcia aliĝpeto kaj resti membro tra la tuta mandato. Nove nomita sekciestro devas esti kaj resti internacia membro de ILEI.

Komento: Ŝanĝita en Parma 2006 de du jaroj al unu (sed neniam efektivigita), konfirmita en Matanzas, kaj per fizika voĉdono. Kion signifas “elekto-jaro”, – elekto de kiu?

## Sekcioj kaj reprezentantoj

# Punkto 7.3.3.3:

Nuna teksto:

La sekciestro havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla. Li reprezentas la Ligon en la koncerna teritorio.

Nova teksto:

La sekciestro havas trijaran mandaton, estas reelektebla kaj reprezentas la Ligon en la koncerna teritorio. La mandato finiĝas, same kiel tiuj de la sekciaj komitatanoj, en la 31a de marto en la jaro antaŭ la elekto de nova estraro de ILEI.

Komento: Necesas difini la komencon kaj finon de la mandato. Kial “Li”? Restu kiel nun, ke ILEI difinas la mandatperiodon de sekciestroj, sed ne de la ceteraj sekciaj oficuloj.

# Punkto 7.3.3.4:

Nuna teksto:

La sekciestro respondecas pri la pago de la kotizo antaŭ la 31a de marto kaj samtempa sendo de la membrolisto al la sekretario kaj la estrarano pri financoj de la Ligo.

Nova teksto:

La sekciestro respondecas pri la pago de la kotizoj por siaj sekciaj membroj antaŭ la 31a de marto kaj samtempa sendo de la membrolisto al la sekretario kaj la estrarano pri financoj de la Ligo.

Komento: Temas pri pli ol unu kotizo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Sekcioj kaj reprezentantoj

# Punkto 7.3.3.6:

Nuna teksto:

La sekciestro respondas al la cirkuleroj kaj al skriba voĉdonado maksimume 40 tagojn post ilia forsendo de la sekretario de la Ligo.

Nova teksto:

La sekciestro respondas al retaj komunikoj bezonantaj respondon ene de 10 tagoj post ilia forsendo de la sekretario aŭ alia estrarano de la Ligo, kaj al tiaj fizikaj komunikaĵoj ene de 40 tagoj. La sekciestro plusendas publikajn komunikojn de ILEI al la sekciaj membroj.

Komento: Pratempaĵo. Sekciestroj ne voĉdonas – nur komitatanoj. Multaj komunikoj ne postulas respondon, sed prefere plusendon al la enlandaj membroj.

# Punkto 7.3.4.1:

Nuna teksto:

Reprezentanto devas esti membro de la Ligo almenaŭ unu jaron antaŭ la elekto-jaro kaj resti membro tra la tuta mandato.

Nova teksto:

Reprezentanto-kandidato devas esti internacia membro de la Ligo en la jaro de la peto-ektrakto, kaj post akcepto, devas resti tia membro tra la tuta mandato.

Komento: Oni diris ke en Parma la komitato ŝanĝis tion. Raporto pri la kunsidoj ne mencias tion. Trovendas la protokolo. Ĉiuokaze la komitato nun akceptis tion. Surprize, ni nenie trovas postulon, ke en lando kun reprezentanto estu iuj ajn pliaj homoj, nek eĉ ke ili estu membroj de enlanda sekcio. Tio aperu en la gvidilo por reprezentantoj.

# Punktoj 7.3.4.2 kaj 4:

Nuna teksto:

Reprezentanton nomas la Estraro.

Nova teksto:

Reprezentanton nomas kaj malnomas la Estraro, informinte la Komitaton pri tio.

------------

Nuna teksto:

Reprezentanto havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla.

Nova teksto:

Reprezentanto havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla, laŭ samaj templimoj kiel sekciestroj.

# Punktoj 7.3.4.7 kaj 7.3.5:

Nuna teksto:

La reprezentanto respondas al la cirkuleroj maksimume 40 tagojn post ilia forsendo de la sekretario de la Ligo.

Nova teksto:

Reprezentantoj respondas aŭ plusendas cirkulerojn same kiel sekciestroj.

-------------

Nuna teksto:

Sekcioj kaj reprezentantoj nomas komitatanojn laŭ artikolo 7.1.2

Nova teksto:

Sekcioj nomas komitatanojn laŭ artikolo 7.1.2

## Sekcioj kaj reprezentantoj

# Punkto 7.3.7:

Nuna teksto, tria sub-punkto:

• raportas skribe al la sekretario, antaŭ la 31a de marto, pri siaj agoj kaj atingoj dum la pasinta jaro.

Nova teksto, tria sub-punkto :

• raportas skribe al la sekretario, antaŭ la 31a de marto, pri la agoj kaj atingoj de la sekcio dum la pasinta jaro, prefere pere de respondiloj kreitaj tiucele.

Komento: La sekciestro ne raportas pri siaj personaj agoj kaj atingoj, sed pri tiuj de la sekcio. Uzo de respondilo ebligas komparojn kaj analizojn inter sekcioj.

# Pliaj bezonoj

Eble en Kopenhago la komisiono sukcesos prizorgi ĉi tiujn punktojn:

- Kondiĉoj por ŝanĝi Statuton, Regularojn kaj Gvidilojn, aperu en punkto 9.
- Ni menciu regulare la devon de ĉiu oficanto fine de oficado orde transdoni siajn dokumentojn kaj datumojn. Sed kie plej konvene?
- Protektoj okaze de intenco eksigi sekcion, sekciestron, reprezentanton, ktp – la koncernato kaj la estraro havu tri-monatan averton. Kie plej konvene?
- Sekciestroj, reprezentantoj kaj komitatanoj havas fiksan tri-jaran mandaton, kiu ekas martofine en la jaro de estrarelekto. Se oficanto forlasas la postenon ajnkiale antau la fino de la trijara mandato, la nov-elektito deĵoras ekde la elektiĝo ĝis la fino de tiu mandato (do dum malpli ol tri jaroj). Same validas por nove mezmandate nomumitaj komitatanoj, sekciestroj kaj reprezentantoj.

Fino de la modifproponoj